


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO“

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
 ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 1,50 NED. GULDENO AŬ EGALVALORO.

Por progresintoj.

FISKAPTISTOJ SUR MARO.

La ŝipo estas tre malgranda. Longeco: 17 metroj; larĝeco je la mezo de la ferdeko: 3 metroj. Oni ĝin konstruis speciale por fiŝkapti per trenreto. Ĝi konsistas el tri precipaj partoj: la unua por la fiŝoj, la dua por la maŝino kaj la tria por la homoj; nenie tro da spaco.

Sub la ferdeko inter la flankoj de la ŝipo amasiĝas la kaptitaj fiŝoj en du vastaj ĉambroj: la pli grava antaŭe, la alia malantaŭe. Miksitaj kun glacio 12 mil kilogramoj da fiŝoj tiel venas el la maro al niaj tabloj.

Meze inter la du fiŝĉambroj jen la maŝino. Nigra, fortega, impona ĝi donas vivon al tiu ĉi ligna estaĵo. Ĝiaj 128 ĉp. antaŭenpuŝas la ŝipon kontraŭ ĉiajn ventojn, kondiĉe ke oni nutru ilin per bareloj da „mazuto“ kaj per litroj da oleo. Tiun potencon oni uzas ankaŭ por suprenlevi la reton kaj por lumigi la internon de la ŝipo.

Tie ĉi vivas dek homoj: ok fiŝkaptistoj, unu ĉefmeĥanikisto kaj unu helpmeĥanikisto, kiu estas samtempe kuiristo. Kvin el ili povas kuŝi en malgranda kvadrata ripozejo, kies sola malfermaĵo estas mallarĝa truo, kiu ebligas iri sur la ferdekon. La aliaj deĵoras.

Ĉiuj obeas la ĉefon; li estas la sola mastro post Dio. Li mem plej ofte tenas la radon, per kiu li direktas la ŝipon. Li prizorgas

la ordigon de ĉio, kaj disdonadas la laboron al ĉiuj. Li ankaŭ funkciigas la radioaparaton.

Alia grava persono estas la ĉefmeĥanikisto. Li zorgas pri bona funkciado de la maŝino.

Tiel du homoj tenas en siaj manoj la vivon de la tuta ŝipanaro: La mastro, kiu sola konas la vojon, la ĉefmeĥanikisto, kiu sola scias la sekretojn de la maŝino.

La fiŝkaptistoj manipulas la grandan reton, kiu kaptas la fiŝojn, kvardek metrojn sube. Tiu kaptilo formas sakon. La enirejo larĝe malfermiĝas kvazaŭ buŝego, kies malsupra parto ĉiam treniĝas sur la fundo de la maro, dum la supra parto estas tirita supren de flosaĵoj el fero aŭ el vitro. La tuto ŝajnas eksterordinara monstro trairanta la maron por sin nutri per miloj da fiŝoj. Ĝi englutas ĉion, kion ĝi trovas survoje: longajn, rondajn, platajn, pezajn, malbelajn, bongustajn, ĉiajn specojn de fiŝoj ĝi enkarcerigas inter la maŝoj de siaj flankoj. Dum 2 horoj kaj duono ĝi serĉas nutraĵon sur la vastaj ĉaskampoj de la maro. Poste ĝiaj servantoj tiras ĝin vertikale supren dum terura bruo de maŝino, leviloj, krioj kaj fajfilo. — Oni malplenis ĝin, tirante ŝnuron de nodo, kiu fermis la malantaŭan parton. Tiam la fiŝoj falas amase sur la ferdekon. Maristoj enkeligas ilin, dum aliaj denove subakvigas la grandan reton.

Nun tiu ĉi kuŝas ĉe la bordo de la ferdeko zorge ligita de la fiŝkaptistoj. La ŝipeto trankvile luliĝas, karesante la muron de la alta kajo, kiun oni povas atingi per longa vertikala ŝtupareto el fero.

Antaŭ kelkaj minutoj venis doganistoj. Ili scivole sin klinis super la ŝipeton. Post kelkaj paroloj kun la maristoj ili eltiris per ŝnuro kelkajn korbojn da fiŝoj kaj ŝanĝe malsuprenigis kelkajn litrojn da vino.

Ĝoje la maristoj kantas, trinkante ĝis kompleta ebriiĝo. Ĉio estas bona, ĉar la fiŝkaptado finiĝis. Multaj fiŝoj facile vendeblaj logas en la ventro de la ŝipo. — Vespere ĉiu baldaŭ retrovos sian familion kaj sian liton post ok tagoj pasigitaj sur la maro. Ĉiuj zorgoj estas for, oni rajtas festadi nunmomente.

Nun, jes sed hieraŭ

Blovis forta vento el okcidento. La homoj ŝanceliĝis kaj glitis sur la moviĝanta kaj kliniĝanta planko. Ondegoj furioze frapis la flankojn de la ŝipeto; kelkfoje balais la tutan ferdekon kaj ofte ŝprucigis pluvon da sala kaj malvarma akvo sur la virojn. Malgraŭ

la malbona vetero tiuj ĉi fiŝkaptis ĉar ili devas vetbataladi pri laboremo kontraŭ tiuj de la grandaj ŝipoj. — Tamen la kondiĉoj estas malsamaj. Kia penego sur tiu ĉi ŝipeto!

Subite aperis el sia truo la nigra ĉefmehanikisto. Li rimarkis neordinaran perdfluon de la brulmaterialo. Antaŭ ol li sukcesos ripari la tubon, mankos la kara fluidaĵo. Tiam ĉesos la fortega vivo de la maŝino. Vento kaj ondegoj nerezisteble puŝos la ŝipon al rokoj aŭ sur sablon, kie okazos katastrofo. Tion tuj komprenis la mastro. Li ĉesigis la fiŝkaptadon, kaj senprokraste direktis la ŝipon al la plej facile atingebla haveno.

La kaptistoj sin interpretis en la malgranda ripozĉambro; ili estis malkontentaj. Iu plendis pri la malkomforto: dum 8 tagoj ili nek lavis nek razis sin, ĉar estas neeble kunporti sufiĉan kvanton da rivera akvo. — Alia ĝemis pro la nutrado; ĝi konsistas el fiŝsupo, bolkuiritaj fiŝoj, frititaj fiŝoj kaj sardeloj en skatoletoj. Eĉ hodiaŭ mankis pano!

Ĉiuj pensis pri la danĝero, kiu ilin minacas. Tion ili ne diris, sed bone ili sciis, ke la ridinde malgranda buo apenaŭ sufiĉus por subteni tri homojn, kiam la ŝtormo ĵetus ilin en la ondojn. La ŝtormo aŭ la mino! Pasintan semajnon dekdu kamaradoj perdiĝis en la maron kun sia ŝipo pro minkolizio.

Ja ekzistas la radioaparato. Ĝi ebligas helpalvokon, sed kiam alvenos la savontoj? Precize je tiu momento la mastro alvokis la marbordan stacion „Radio Bulonjo”.

Dum tuta horo li vane klopodis ricevi respondon. Verŝajne pro fulmotondro la radiooficisto ne aŭdis la voĉeton. Tie ĉi sur la ŝipeto la maristoj aŭdis pecetojn de melodioj disaŭdigataj el amuzejoj. — Tio ŝajnis kvazaŭ mokridoj inter la bruegoj de la ŝtormo. Subite ĉesis la bruo de la aparato kaj samtempe mallumiĝis la lampoj: la elektroproduktilo ĉesis funkcii.

Ĉiuj grumblis pri la mastro, kiu kondukas ilin sur fiŝlokon kia ajn estu la vetero!

Starante ĉe la direktilo la mastro ne aŭdis la mallaŭdojn, sed li scias kion pensas la subuloj. Li mem pensas, ke se oni restus sur la bordo, dum grandaj ŝipoj fiŝkaptadas, oni perdus monon kaj energion. Eĉ en tiu ĉi aĉa minuto li preferas frunte kontraŭbatali gravajn danĝerojn ol vivi en mizero.

Cetere li havas plenan fidon pri si mem. Li jam spertis aliajn malfacilaĵojn. Li konas ĉiujn vojojn en tiu marparto.

Noktomeze, la ŝipeto atingis la havenon „Calais”, kiam la brulolikvaĵo estis tuj elĉerpiĝonta.

Post ripozo kaj ŝarĝado de sufiĉa kvanto da brulaĵo la ŝipeto iros al Bulonjo, kaj la maristoj hejmen. — Pro tio ili festadas, jam forgesinte la malfacilajn horojn.

Kiom da tempo daŭros la plezuro?

Kvardek horojn! Ne pli, ĉar la monsumo havigita de la fiŝvendado ne permesas longan libertempon.

Kalkulu! Post detranĉo de la ĝeneralaj kostoj duono iros al la posedanto de la ŝipo. La alian duonon dispartigos la ŝipanaro laŭ dekdu egalaj partoj, ĉar du partoj restas por la maŝino. Do, ĉiu homo ricevos nur dudekkvaronon de la profito.

Tiu ĉi rakonto ne estas imaga. La 6an de Aŭgusto 1946a la maristoj de la ŝipeto „Eŭreka” el Bulonjo travivis tian aventuron. — Tiel vivas kutime la fiŝkaptistoj de la malgrandaj trenretoŝipoj.

Vi komprenos mian maristan amikon, kiu sopiras al la fino de sia marista kariero kaj diris: „Feliĉe mi havas nur du filinojn, kaj neniun filon!”

Turin (Francujo).

AL TINJO (13-jara lernanto mia).

Printemp' nun, kara, vian koron spronas,
Okuloj viaj sunaj fajre brilas,
Vivama rido ĝoja sorĉe trilas
Kaj vigla kanto via gaje sonas.

En rave dolĉaj revoj vi nun dronas,
En vi Printemp' ankoraŭ nun jubilas.
Aŭskultu, kara, kion mi konsilas:
Akceptu, ĝuu, kiam Vivo donas!

Ĉar ankaŭ ja por vi la tempo venos
Kiam forlasos vin favor' de l' sorto,
Kiam feliĉon vian Vivo prenos,
Rabos, konkure kun kruela Morto!

Esperas mi, ke tiam vin subtenos,
Kara, de l' venkivolo' fiera forto!

Petro Rulofido (1936).

En 1947 la Internacia TJO-Kunveno okazos en Britujo
Detaloj sekvos en la novembra numero!

Jam nun ekŝparu!!!

DANK' AL ESPERANTO.

La 21-an de majo mi troviĝis en la urbo A... (Francujo). La soldatoj de la invada armeo alvenis en tiun urbeton, kiam ekvesperiĝis. La sekvantan matenon ili arestis multajn civilulojn. Mi mem estis unu el tiuj arestitoj, kun Alĝeriano kaj Belgo. Ni estis lokitaj apud muro, la brakoj supren. La Belgo estis Esperantisto kaj mi iomete lernis la lingvon. Ni do interŝanĝis kelkajn vortojn. Subite germana gardisto proksimiĝis kaj demandis: „Ĉu vi estas esperantistoj?”

„Jes”. — „Bone, mi klopodos helpi vin forkuri, ĉar la grupo estas elektita por esti mortpafata.”

Poste li foriris. Eble unu horon post tiu interparolo, en momento kiam la atento de ĉiuj arestitoj estis tirata al arestito kiu ricevis baton en femuron ĉar li mallevigis la brakojn, mi sentis min tirata malantaŭen.

Mi turnis la kapon kaj rekonis la germanan soldaton, kiu, demetinte la kaskon, faris signon al mi. Mi falis teren, imitata de la Alĝeriano kaj la Belgo, kiuj mem ankaŭ vidis la signon. Ni rampis ĝis malantaŭ la proksimaj domoj. Alveninte tien, mi post rapida manpremo forkuris tra la kampoj.

Poste mi eksciis, ke 141 civiluloj estis mortpafataj tiun tagon. Dank' al Esperanto mi kaj miaj du kamaradoj, pri kiuj mi poste nenion aŭdis, estis savitaj.

Jen kial mi finlernis la lingvon kaj gvidas kurson en nia urbo.

A. J. (El „Svisa Espero”).

Feliĉe!

La limo inter Usono kaj Kanado estas sufiĉe rekta. Tamen la vilaĝoj laŭ la limo kuŝas ne precize en unu linio.

Tiel povas okazi en tondejo en Rock Island, ke oni, sidante sur seĝo, povas tondigi siajn harojn en Kanado, kaj samtempe igi purigi siajn ŝuojn en Usono.

Iun tagon oni dokumente devis fiksi la destinon de farmdomo, apartenanta al maljuna virino. La mezuristoj decidis, ke la domo staras ĝuste antaŭ la limo, en Usono.

„La maljunulino surpriris pro faciliĝo: „Kiom feliĉa mi do estas. Mi ja ĉiam aŭdis, ke en Kanado la vintroj estas terure malvarmaj!”

Ni naskiĝis kiel originaluloj, ni ne mortu kiel kopioj!

KIEL LUIZA LABORAS?



Patrino rigardas al la manĝiloj sur la tablo. „Vi zorgas bone, Luiza”, ŝi diras. „Ni manĝu. Kie estas Anita?”

„Ŝi ludas kun Maria,” respondas Luiza.

„Pablo! iru al la najbaro kaj diru al Anita, ke ŝi venu al la hejmo!”

Ramono rigardas al la oranĝoj. „Mi soifas”, li diras. Patrino ridas. „Akvo estas bona trinkaĵo! Jen estas glaso,” ŝi diras.

Anita alvenas, do la familio nun estas kompleta. Ili iras al la tablo. Patro, Patrino kaj la

kvar grandaj infanoj sidas sur seĝoj; Gracia kaj Ramono sidas sur la benko.

Baldaŭ aperas diversaj manĝaĵoj sur la tablo: plado kun terpomoj, fiŝaĵo kaj fruktaĵo.

Kiel la familio manĝas? Ĝi manĝas bone, ĉar Luiza kuiras bone.

Je la fino de la tagmanĝo venas la „gofio”¹⁾: la kaĉo el faruno. *Kiel* ĝi gustas? Ankaŭ la „gofio” gustas bone.

Post la tagmanĝo Patro iras al la najbaro kaj Felipe iras al la kino. Patrino estas laca.

„Ripozu, Patrino”, diras Luiza. „Mi zorgas pri la infanoj kaj la laboro.”

Baldaŭ Ramono kaj Gracia kuŝas en la litoj. Ankoraŭ kiso de Patrino kaj baldaŭ ili dormas profunde.

En la kuirejo laboras Luiza. *Kiel* ŝi laboras? Ŝi laboras rapide kaj nete. Anita helpas. Post kelka tempo ili estas pretaj.

a — e

La flor-o estas eksterordinar-a.

La lum-o estas hel-a

La flor-o estas ruĝ-a

ankoraŭ

dir-u

ĝi gust-as

la kaĉ-o

kiel

komplet-a

La flor-o estas eksterordinare bel-a

La lum-o estas tre hel-a

La flor-o estas hele ruĝ-a.

lac-a

ni manĝ-u

pret-a

ripoz-u

mi soif-as

la tag-manĝ-o

Ekzerco: Respondu al jenaj demandoj: Kio estas oranĝo? Kio estas kolombo? Kio estas kaprino? Kio estas seĝo? Kio estas papilio? Kio estas kaktio?

Kia estas oranĝo? Kia estas kolombo? Kia estas Lizi? Kia estas la seĝo? Kia estas la papilio? Kia estas la kaktio?

Kie estas la oranĝo? Kie estas la kolombo? Kie estas Lizi? Kie estas la seĝo? Kie estas la papilio? Kie estas la kaktio?

Ekzerco: Enmetu a ŭ e: La knabino estas bel. . La knabino dancas bel. . La viro laboras bon. . La knabo estas ĝentil. . La infano dormas trankvil. . La virino balaas net. . La hundo bojas rapid. . La fiŝo estas bon. . La oranĝo estas malbel. . La kato manĝas net. . La mulo iras malrapid. . La banano estas dolĉ. .

Gramatika enhavo: la adverbo (ĉe adjektivo) e; la korelativo kiel; ripetado u, aĵ, a-e. .

1) gofio = kaĉo el rostita faruno kun salo.

Leciono 18.

SABAT-VESPERO.



La kudro-maŝino staras sur la granda tablo; Patrino kaj la tri infanoj sidas ĉirkaŭ ĝi. Patrino kaj Luiza kudras, Pablo kaj Anita rigardas kaj babilas.

„Ĉu vi promenis hodiaŭ en Las Palmas, Pablo?” demandas Luiza.

„Ho jes!” diras Pablo. „Kie vi promenis?” demandas Patrino.

„Mi iris al la parko kaj mi promenis sur la bulvardo laŭlonge de la marbordo ĝis la haveno.”

„Nu! nu! diras Patrino, „Ĉu vi iris al Puerto de la Luz? Tio estis longa promenado. Pablo! Ĉu alvenis novaj ŝipoj?”

„Jes Panjo! Hieraŭ alvenis la Kolombia (Colombia) kaj la Kotika (Cottica). Ili estas tre grandaj ŝipoj, Panjo!”

„Kaj Pablo! Ĉu estis novaj turistoj por nia insulo?”

„Fernando diris, ke alvenis amerikanoj por la Hotelo Metropolo kaj nederlandanoj por la Hotelo Madrid.”

„Kiu estas Fernando?” demandas Luiza.

„Fernando del Oro de Toledo, la filo de nia dommastro,” respondas Patrino por la infano. „Do vi ne estis sola dum la promonado, Pablo!”

„Ĉu Fernando estas afabla knabo?” demandas Luiza.

Pablo ne respondas. „Ĉu li estas afabla?” Patrino nun demandas.

„Mi ne scias,” diras Pablo.

an

Ameriko; amerik-an-o insul-o insul-an-o; urb-o urb-an-o
Nederland-o; nederland-an-o; ŝip-o ŝip-an-o; vilaĝ-o vilaĝ-an-o

njo

Anita	— Anjo	— Aninjo;	Luiza	— Lunjo
Gracia	— Granjo		Maria	— Manjo
Julia	— Junjo	— Julinjo;	Patrino	— Panjo

as-is

Mi alven-as	mi alven-is;	mi ir-as	— mi ir-is
mi babil-as	mi babil-is;	mi promen-as	— mi promen-is
mi est-as	mi est-is;	mi respond-as	— mi respond-is

afabl-a	la haven-o	laŭlonge de	sabat-vesper-o
la bord-o	hieraŭ	la mar-bord-o	la ŝip-o
la bulvard-o	ho!	nu!	la turist-o
dum	hodiaŭ	la park-o	
ĝis	la kudro-maŝin-o	la promenad-o	

Ekzerco. Metu en la pasintan tempon: mi manĝas; vi naĝas; li trinkas; ŝi aĉetas; ĝi dormas; ni aŭdas; ili aperas; mi dancas; vi batalas; li diras; ŝi fosas; ĝi flugas; ni instruas; ili kuiras.

Gramatika enhavo: La pasinta tempo de la verbo: is; la sufiksoj an, nj; la prepozicioj: dum, ĝis.

Korekto: En la 16-a leciono staras ĝential (7-a linio). Tio devas esti: ĝentila.

Kial mendi viajn esperantajojn ĉe TJO-Centro?
Ĉar vi tiel subtenas la junularmovadon!

POR KOMENCANTOJ.

Li unue devis rigardi.

Sinjoro iris sur longa, polva vojo. Li aspektis tre lace. Oni povis vidi, ke li marŝis jam longe. Apud la vojo sidis fiŝkaptisto. La sinjoro iris al li, kaj diris: „Kiom da tempo mi ankoraŭ bezonos por atingi la urbon?”

La fiŝkaptisto tute ne respondis. La sinjoro ripetis pli laŭte: „Kiom da tempo mi ankoraŭ bezonos por atingi la urbon?”

Ne venis respondo.

La sinjoro iom atendis. Li pensis: „La viro certe estas surda”, kaj li promenis pluen. Li apenaŭ faris 20 paŝojn, kiam la fiŝkaptisto kriis post li: „Post unu horo vi estos en la urbo!”

La sinjoro tre miris. Li turnis sin kaj demandis: Sed, kial vi ne tuj diris tion???”

„Kompreneble mi ne povis! Antaŭe mi devis vidi, kiom rapide vi iras!”

Respondu al jenaj demandoj: Kiu marŝis sur la vojo? Kia estis la vojo? Kiel la sinjoro aspektis? Kion oni povis vidi? Kiu sidis apud la vojo? Al kiu la sinjoro turnis sin? Kion li demandis? Ĉu la fiŝkaptisto respondis? Kial la sinjoro ripetis la demandon? Ĉu venis respondo? Kion pensis la sinjoro? Kion li faris? Kion kriis la fiŝkaptisto? Kial la fiŝkaptisto ne tuj respondis?

Li havis monon!

Karlo estis kvarjara bubo. Lia patrino diris al li: „Karlo, iru al la butikisto por aĉeti funton da siropo. Jen vidu, mi metas la monon en la siropujon.

Karlo paŝis fiere al la butikisto.

„Funton da siropo, mi petas.”

La butikisto estis maljuna viro. Li ne rigardis bone en la ujo, sed tuj verŝis la siropon en ĝin. Tiam li donis la poton al Karlo, kaj diris: „Ĉu vi havas monon, bubeto?”

„Jes,” diris Karlo, „Ĝi kuŝas en la potu!”

Kiom aĝa estis Karlo? Ĉu li povis fari aĉetojn? Ĉu li havis patrinon? Kion Karlo devis aĉeti? Kie li devis aĉeti siropon? Kion la patrino metis en la ujon? Ĉu Karlo diris tion al la butikisto? Kia estis la butikisto? Ĉu la butikisto bone rigardis? Kion li faris? Ĉu Karlo donis la monon al la butikisto? Kion demandis la butikisto? Kion diris Karlo?

Ĉu vi jam varbis vian korespondanto(j)n por TJO?

La malsanulo.

Iam sinjoro vizitis faman kuraciston en la urbo Venecio, kaj diris: „Mi estas nervmalsana. Ĉu vi povas helpi min? Mi ĉiam havas kapdoloron kaj estas tre melankolia.”

„Ĉu eble via koro ne bone funkcias?”

„Mia koro estas tute sana!”

„Ĉu vi perdis karan amikon, aŭ parencon?”

„Ankaŭ ne.”

„Vizitu fremdajn landojn, tio distros vin!”

„Ho sinjoro kuracisto, mi jam estis en multaj landoj, sed ĉie mi enuis”.

„Se estas tiel mi scias ankoraŭ unu rimedon: Iru al la koncertejoj por aŭskulti la faman kantiston Veluti. Tio gajigos eĉ la plej melankolian homon!”

„Ho ve! Tio certe ne eblas, ĉar ... mi estas Veluti.”

Respondu al jenaj demandoj: Kie loĝis la fama kuracisto? Kiu vizitis lin? Kial la sinjoro vizitis la kuraciston? Kion la kuracisto konsilis al la sinjoro? Ĉu la sinjoro jam vizitis fremdajn landojn? Ĉu tio helpis? Kial la sinjoro ne povis aŭskulti al Veluti?

Vera paradizo.

Du araneoj loĝis en malsamaj partoj de preĝejo. Foje ili renkontis unu la alian. Unu el ili tre plendis. Ĝi diris: „Mi loĝas sub la mola rando de la katedro. Sed ĉiun dimanĉon la predikanto forte manfrapas la randon. Li kaŭzas al mi terurajn horojn.”

„Venu loĝi kun mi!” diris la alia. „En mia loĝejo estas trankvile. Neniu ĝenas min.”

„Ĉu vere? Kaj kie vi trovis tiun paradizon?”

„Ho, mi ĉiam restas en la kesteto por la almozoj!”

Rakontu la enhavon per propraj vortoj.

Ruza — malruza.

Iam la malgranda Petro ne ŝatis iri al la lernejo. Li telefonis al la instruisto.

„Haló” sonis el la aparato, „Vi parolas kun s-ro Klero”.

Petro klopodis pezigi sian voĉon, kaj diris: „Ho sinjoro, mi multe bedaŭras, sed Petro hodiaŭ ne povas viziti la lernejon. Li estas tre malsana.”

La instruisto: „Aĥ, mi tre bedaŭras! Mi esperas, ke li baldaŭ resaniĝos! Sed — kun kiu mi parolas?”

Petro: (konfuzite): „Kun mia patro!”

Problemo.

Patro, kion manĝas tineoj?

Vestojn, bubo.

Patro, kaj kion ili manĝis, kiam la homoj ankoraŭ ne havis vestojn?

El „Heroldo de Esperanto”.

Ĉu vere?

Kampano vojaĝis al Britujo. Amiko demandas: „Sed, ĉu vi povis esprimi vin tie ĉe la britoj?”

„Mi? Kompreneble! Sed estis la britoj kiuj neniam povis respondi al mi!”

Kompatindulo!

Almozulo rakontas sian lastan aventuron: „Jam dum du tagoj mi ne manĝis. Senespera mi ĵetis min en riveron, por morti. Sed barkisto kaptis min, kaj remetis min sur la teron. Kaj, ĉu vi povas kredi? Oni donis dudek frankojn al li, kaj mi ricevis — neniom!

Vortludo.

Napoleon I volis ofendi kardinalon Saverio: „Ĉu estas vere, ke italoj estas friponoj?”

„Ne ĉiuj, Moŝto, sed *bona parto*”! estis la trafa respondo.

LUDO.

La gvidanto rakontas: „Mi trovis viron, kiu tute perdis la memoron. Por eltrovi kiu li estas, kio estas liaj aĝo, profesio, ktp., mi kunprenis la enhavon de liaj poŝoj. Ni kune esploru tion”.

Samtempe li metas sur la tablon ĉiajn objektojn, (ilustritajn poŝtkartojn, notlibron, biletojn) laŭ kiuj oni povas diveni la devenon, loĝlokon, aĝon, ktp. kaj specialajn ilojn, laŭ kiuj oni povas diveni la metion (martelon, najlojn, komercaĵojn, ktp). Ĝi estas bona metodo por paroligi komencantojn.

Kursmaterialon perfektan oni trovas en la binditaj jarkolektoj de „La Juna Vivo”. Plej taŭga lernilo certe troviĝas en la unua jarkolekto: Krom kurson por komencantoj la libro donas amason da simpla legaĵo, kantojn (kun muziknotoj), enigmojn, ludojn, ktp, tiel ke la lernantoj samtempe praktike povas apliki la lingvon. Prezo f 1.—.

T.J.O.-RUBRIKO.

(S^{ekr.} F. Meydam, Owenstr. 59, Leerdam).

Pri la laborkunsido en Blankenberge aperos aparta bulteno, kiun ricevos nur la TJO-anoj.

El la nederlanda TJO-Sekcio. En 1947 skotaj gejunuloj estos invitataj por 4-semajna restado kaj migrado en Nederlando. La nederlanda sekcio zorgu pri dormlokoj kaj manĝaĵoj dum la monato julio. En la fino de julio nederlandaj gejunuloj akompanos la skotojn al Skotlando kaj restos tie dum la monato aŭgusto kiel gastejoj de la skotoj.

Jen proponoj kiel solvi la financon problemon:

1. Ni laboru per listoj por kolekti monon (Mendeblaj ĉe A. Wendt, Laing's Neckstr. 33^a, Amsterdam).
2. La filmservo de la nederl. sekcio donos 50 % de ĝia profito.
3. Wendt pretas prelegi pri Skotlando en la nederl. kaj esp. lingvoj. La profito estos por la skota aventuro.
4. Oni instigu grandajn firmojn reklami siajn varojn en la „Tago-libro pri la granda aventuro”. Ĝi estos kunmetita el la verkaĵoj de la nederlandaj kaj skotaj partoprenintoj mem, kaj aperos en tri lingvoj (esperanta, angla, nederlanda).
5. Oni pretos prezenti mallarĝfilmojn skotlandajn dum julio en Nederlando kaj nederlandajn dum aŭgusto en skotlando.

Kiu volas helpi per io supremenciita, aŭ havas aliajn ideojn, turnu sin al A. Wendt.

Ĉiuj, kiuj deziras partopreni, tuj anoncu sin (14-18-jaraĝuloj). Kiu ne scipovas Esperanton devas sekvi kurson.

La nombro da partoprenantoj estu kiom eble plej granda! Ni per ĉiuj rimedoj kolektu monon, por ke la partoprenkostoj estu minimumaj!

Ni urĝe alvokas ĉiujn Esperantistojn, el kiu ajn movado, ke ili helpu! Forta junularmovado ja estas en la intereso de ĉiuj movadoj!

Dumonate ni raportos pri la evoluo de nia plano. Kiu volas kunlabori aŭ subteni la aventuron do klare sciigu sian adreson. Ĉiuj subtenantoj estos menciataj en la „Tagolibro”.

Gejunuloj! Al Skotlando ni kunportu diversajn naciajn kostumojn! Kiu havas da ili, aŭ povas kudri ilin, bonvolu sciigi tion al André Wendt. Ankaŭ sciigu, ĉu vi kapablas popoldanci aŭ instrui tion, kaj ĉu vi ludas muzikilon!

Dum Kristnasko ni kunvenos en junular-gastejo (ni poste pli detale informos pri tio) por persone kontakti kun ĉiuj partoprenantoj en la granda aventuro. Jam nun anoncu vin, por ke ni zorgu pri gastejo kaj rezervitaj lokoj!

Se eble la tuta Aventuro estos filmata. Tiel ni havigos al la Esperantistaro tre unikan kaj bonan propagandilon!

La Lotumado por akiri filmaparaton bone sukcesis! Plena listo de la premioj aperis en la Bulteno de la nederlanda sekcio. Financa raporto sekvas en la sekva bulteno.

Nun la filmoj povas esti prezentataj en ĉiuj lokoj! Se vi deziras montri

la filmojn de propagandisto bonvolu turni vin al A. Wendt, Laing's Neckstr 331, Amsterdam-O., kiu dum kelkaj semajnoj vojaĝos tra Nederlando.

Perantoj en aliaj landoj: Sekvu la ekzemplon!

Blankenbergaj Impresoj.

Jam ĉe la komenciĝo ni tuj sentis: tie ĉi denove regas la bonkonata TJO-sfero. Malnovaj amikoj, kiuj dum longaj jaroj ne vidis unu la alian, nun denove renkontiĝis. Bone montriĝis, kiel fortaj estas la ligiloj de amikeco, faritaj antaŭ longa tempo, kiujn eĉ la kruda milito ne povis rompi. Sed ankaŭ la novaj amikoj, kiuj unu-afoje estis en nia rondo, tuj sentis sin hejme kaj ĉie oni vidis gajajn vizaĝojn.

Ne facile estas diri, kio estis la plej bela parto de la kunveno; ĉio estis tiel bonege organizita, ke nenie aŭdiĝis plendoj aŭ malkontentaj vortoj: honoron kaj dankon al nia diligenta belga ĉefperanto, kiu kun sia entuziasma grupo tiel bonege laboris. La Blankenberga Konferenco ĉiam restos en nia memoro kiel unu el la plej belaj internaciaj TJO-kunvenoj.

Inter la ĉeestintoj estis junulo, kiu de la komenciĝo de la milito ne plu povis ridi. Oni jam pensis, ke li tute forgesis ridi gaje kaj senzorge. Tamen dum la Blankenberga kunveno li subite denove ekridis, kaj la zorgaj trajtoj en lia vizaĝo malaperis. Simila estis la sperto de preskaŭ ĉiu; oni sentis, ke la Vivo ĉiam havas celon kaj ke ĝi estas altvalora, malgraŭ ĉio. Klare oni vidis, ke ankoraŭ ekzistas bono kaj fideleco inter la homoj kaj ke ne ĉiu estas tiel malbona kiel oni emis pensi dum la nigraj jaroj de la milito. Kaj ĉu tio ne estas kaŭzo por ridi kaj kanti? Amikino nia esprimis tiun animstaton: „Himno al la Ĝojo” estis la nomo de la belega kanto de L. v. Beethoven, kiun ŝi kantis. Ĉiuj spertis iom de la superaj sentoj, kiujn oni ne povas esprimi per vortoj. Sed aŭdante la belege klaran voĉon de nia franca ĉefperantino oni tuj komprenis: Ĝoju pri la vivo, pri nia juneco kaj saneco kaj gardu la kredon pri pli bona mondo, kiu finfine devos veni. Kaj krom tio: laboru por la idealo, estu optimismaj kaj propagandu ĉie kie nur estas okazo. Ĉar ni, junaj Esperantistoj, bone scias, ke la granda Idealo de mondopaco nur tiām estos efektivigata, kiam ĉiuj homoj almenaŭ povos kompreni unu la alian. Esperanto estas la bazo sur kiu la aliaj idealoj povas estis konstruataj. Nia estas la malfacila tasko, fari la bazon kiel eble plej forta.

Pro tio mi multe bedaŭris, ke parto el niaj anoj ne ĉeestis la laborkunsidon. Se ili sciuz, kiel okazas niaj TJO-kunvenoj, ili certe neniam plu forrestus. Laŭ mi dum niaj laborkunsidoj oni plej bone spertas la amikecon kaj laboremecon inter la geanoj. En la ĉiutaga vivo oni tiom baldaŭ forgesas, ke ankoraŭ ekzistas aliaj aferoj krom la materia laboro-por-mono en fabrikoj aŭ oficejoj. Ankaŭ ekzistas laboro per kiu oni ne pliriĉiĝas en la ordinara senco de la vorto, sed per kiu oni pliriĉiĝas en maniero multe pli valora: La laboro por la Idealo, kiu estas la sola laboro kiu plene kontentigas nin.

Mi estas konvinkita, ke ĉiu plene amuziĝis laŭ sia propra maniero, dum la kvar festaj tagoj. Sed mi ankaŭ scias, ke la plej bonajn impresojn oni ricevas dum la kunsidoj en kiuj ni kune en bona harmonio preparolas la internan strukturon de nia organizo kaj niajn rilatojn al aliaj Esperanto-Organizoj. Per tiuj oni ricevas la instigon al laboro kaj nur per senĉesa laboro ni finfine atingos la Grandan Idealon.

Amsterdamo, aŭg. 1946a.

M. K.

Kvazaŭ en alia mondo

Blankenberge, 3a Internacia Junularkunveno.

Belega loko en la ĝardeno de la „Rijksnormaalschool” (ŝtata instruista instituto): Nia tendaro antaŭ la junulardomo. Tuj post nia alveno ni trinkis teon en angla-nederlanda esperantista rondo kaj ni estis hejme. Dum la tuta kunveno ni sentis nin en nova hejmo (escepte eble en la malmolaj litoj). En leteroj al amikoj mi skribis: „Ĉi tie mi estas kvazaŭ en alia mondo

Vere ni estis en granda familio kaj ekzempla familio. Kia neforgesebla amika sfero!

Nur unu fojon mi malĝojis: Kiam mi vidis ke nur malmultaj personoj ĉeestis nian laborkunsidon. Kial? Ĉu la bela vetero kulpis pri tio?

La kunveno pasis kun ĝiaj festvesperoj kaj la bela ekskurso al Bruĝo, sed ne forpasis la sfero, ĝi restas en la koroj.

Ne plu forlasu nin, „Sfero”, akompanu nin, ĉirkaŭu nin, ĉiam kaj ĉiam vi estu ĉe ni, dum la laboro kaj en la familio. Ni, konante vin, kreos vin en la vivo de ĉiuj tagoj. Tio eblas!

Henk Uittenbogaard.

NIA TUTMONDA FAMILIO.

..... En la lasta No. de „LJV” mi legis pri raportoj ktp. kaj mi kredas, ke ni devas multe propagandi kaj varbi por atingi nian celon, kaj mi opinias, ke ni povos bone atingi pli ol 3000 abonantojn al nia gazeto! Jen mia propono: Multaj ne volas aboni la gazeton, ĉar ili ne povas pagi la abonkotizon en unu fojo. Estas la tasko de la lokaj TJO-perantoj helpi en tio: Ni ĉiumonate ricevu 10—15 ekz. de „LJV”, kaj ni klopodu vendi tiujn „ponumere inter niaj Esperanto-geamikoj. Tiam la elspezo por tiuj ne estas granda, kaj eble oni poste abonos la revuon, se la enhavo al ili plaĉas! Kion vi pensas pri tio?

Toulouse, 5-9-46.

Dominiko Perez.

Sajnas al ni bona ideo. Multaj TJO-anoj tiel povus vendi nian revuon en sia grupo al ne TJO-anoj. Ankaŭ de la aperintaj numeroj restis eta stoko, escepte de la dec.-januara No., kiu tute elĉerpiĝis. Por grupoj ja estas bona ekzerco legi kaj traduki la revuon dum grupkunvenoj! Ni proponas la vendoprezon po 20 c.

Adm. „La Juna Vivo”.

GENERALAJ SCIIGOJ.

Avizo! En la kadro de Sveda Laborista Esperanto-Asocio estas fondita „Junulara Komitato”, kiu celas propagandi Esperanton en junularaj kaj infanaj organizoj. Oni por tio deziras kontakton kun esperantistoj en ĉiuj landoj, por ricevi informojn kaj materialojn. Ĉiulandaj esperantistoj bonvolu sendi artikolojn pri junularmovadoj en siaj landoj, kiuj estos tradukataj por la svedaj junular-organoj. Estos bonega metodo montri la utilon de Esperanto. Ĉiu sendinto rekompence ricevos sciigojn pri la svedaj organizoj. Sendu materialon al: Junulara Komitato SLEA, Barnhusgatan 8, ö.g.n.b. Svedujo.

Kaptu la okazon propagandi TJO!!!

Germanujo: Ĝis junio okazis 13 disaŭdigoj en Radio München pri la Esperanto-Movado. La lasta prelego estis pri „La junularo kaj la mondo”.

Radio-disaŭdigoj en Ĉeĥoslovakujo: RADIO PRAHA (470 m): lunde kaj ĵaŭde, je la 22.50a horo. RADIO PRAHA (25,34 m): ĉiutage, je la 21-21.30a h. (Bonvolu raporti pri la elsendoj kaj esprimi vian dankon al Radio Praha, Stalinova trida).

RADIO MORAVSKA OSTRAVA (325 m): marde kaj vendrede je la 22.50a h. (Skribu al Radio Moravská Ostrava, Bráfova 5) — RADIO HRADEC KRALOVÉ (280 m): merkrede je la 18.20—18.30a h. (Skribu al Radio Hradec Králové).

La IEL-Petskribo: Ĝis la 24-a de aŭgusto envenis 119000 da subskribitaj deklaroj. Jam alta nombro, tamen ni ne kontentu! Ni daŭrigu la kolektadon, kaj eluzu la okazon propagandi Esperanton!

Esperanto-stratonomoj: En Budapeŝt nun estas „Esperanto-strato”. En Rüsselheim apud Frankfurt a.M. (Germanujo) estas „Zamenhofstrato”. La saman nomon havas strato en Lodz (Polujo).

KORESPONDADRESOJ.

Bulgarujo: S-ro Nikola Iliev Nikolov, kvartalo Geo-Milov 1019, Sofio 13, dez. kor. kun ĉ. 1. Interŝ. geografiajn kartojn poŝtm. k.s.

Ĉeĥoslovakujo: S-ro Imrich Goldstein, Košice, Stefaniková 107, dez. kor., kaj reserĉas siajn malnovajn korespondintojn en Francujo, Aŭstralujo, U.S. S.R. kaj U.S.A.

Josef Vesely, 28-j. kasisto en banko dez. interŝ. let. kaj il. poŝtk. kun esperantistoj en la tuta mondo. Adr: Stankov, Komenského 165.

Francujo: S-ro F. Depreux, 8 Rue Pargaminières 8, Toulouse, dez. interŝ. pm. kvanton kontraŭ kvanto (50—50). Resp. garantiata.

Stud. junulo 17-j. dez. kor. k.ĉ.l. ĉefurbandoj, eĉ N-S. Ameriko, E-Oriento, francaj kolonioj. Div. tem. Jn. Pottier, R. Froust, Quimper (Fin).

Hispanujo: S-ro José Marti, Trafalgar 76—30—2a dez. kor. internacie, interŝ. il. poŝtk. kaj poŝtm. Respondo certa.

Hungarujo: 20-jara hungara dentisto, s-ro Otho Oszadszky, Oroháza, Moricz Zs. u. 49, deziras korespondi kun nederlandaj gejunuloj.

Nederlando: Riet Bankersen, 11-jara knabino, deziras korespondi kun samaĝaj geknaboj. Adr.: Noord, West-Grafdijk.

Mi petas ĉiujn esperantistojn sendi al mi bildkartojn pri via ĉirkaŭaĵo. Surskribu kelkajn vortojn kaj vian adreson, kaj bonvolu glui la pm. bildflanke, por ke mi uzu ilin propagandcele. Mi rekompence sendos il. karton el Nederlando. Adr.: Oene Hoekstra, Koningsweg 9A, Hippolytushoef, Wieringen.

PERANTOJ.

	TJO	LJV
Aŭstrujo: Johann Leopold Germela, Thongasse 5/3/12, Wien III/40.		
Belgujo: C. Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge, ĝiro 4770.86	40 fr.	24 fr.
Britujo: F.ino Rees, „Derwydd”, Seven Sisters, Neath, Glam. Wales	5 ŝil.	\$ 3
Ĉeĥoslovakujo: Jaromír Jermár, Karlovy Vary, c/o Kotva Trída marŝála Koneva 1.	50 kĉs	30 kĉs
Finnlando: Allan Mehtonen, Oulu, Isokatu 67	125 fmk.	75 fmk
Francujo: S.ino Turin, Instruistino, Trépot, Doubs. Gironumero 287.02, Dijon.	100 fr.	70 fr.
Hispanujo: Octavio de Diego la Rosa, Baltazar Gracián 12-3º, Zaragoza	12 pes.	7 pes.
Italujo: Prof. Camuffo Armando, v. Bartolomeo, d'Alviano 4 IV, Trieste	215 L	130 L
Portugalujo: A. P. da Silva, Quinta do Ferro, Rua B. No. 28—20 Dto, Lisbono	25 esk.	15 esk.
Skotlando: S-ro A. Gordon, 28 Holehouse Rd. Kilmarnock	5 ŝ	3 ŝ
Svedujo: K. E. Karlsson, Upplandsgatan 69 ¹ , Stockholm, ĝironumero 252674	4 kr.	2½ kr.
Svisujo: Eugen Klee, Brasselmühle, Rheineck	4 fr.	2½ fr.

La I-a parto de **Paŝo post Paŝo** (Esp. lernolibro, eld. de C. A. J. v. Dishoek en Bussum) elĉerpigis. Represo en 1947. La dua parto ankoraŭ estas mendebla al TJO.-Centro. **Prezo: f 1.—.**